

LA JUNA VIVO

MONATA BAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO“

Redaktejo: S-ino E. Burgler, Amsterdam-W., Overtoom 435²

Administrejo: F-ino C. van Spengen, Hilversum, Loosdrechtseweg 55

Ĝiro de TEJO por Nederlando: 537168 Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro

L'AQUILA: DUA PAŜO SUR VOJO DE REKONSTRUO!

Niaj kongresoj havas kiel junulaj kunestoj apartan karakteron, ne-troveblan en kiu ajn alia Esperanto-kunveno.

Junuloj, pli ol plenaĝuloj serĉas ĝuon en la vivo kaj prave.

Tamen tiuj, kiuj opinias niajn kunvenojn junularajn nure distraj aranĝoj, estas plene malpravaj. Pasis la tempo de la senzorga junaĝo, se ĝi iam ekzistis.

La nuntempa junularo, kvankam materie pli bonfarta ol antaŭaj generacioj, estas tro atakata de mal-facilaj problemoj por pasigi la vivon senzorge.

La venanta kongreso en l'Aquila klare manifestacias la signifon de TEJO por la Esperanto-movado entute. Krom la kutimaj distraj aranĝoj kaj la jarkunsido nun okazos ankaŭ granda Internacia Konkurso, unuan fojon en la historio de TEJO. Ĝi estas eksperimento, sed eĉ kiam ĝi nur parte sukcesos, tio estos jam instigo fari ĝin tradicia ero de la

kongresprogramoj.

Per la konkursoj ni faros la I.J.K.-ojn pli interesaj por la partoprenantoj, pli altnivelaj kaj signifaj inter la multaj okazaĵoj en Esperantio.

Persone mi havas tiajn rilatojn en la Esperanto-movado, ke ankaŭ sen TEJO mi povus labori por Esperanto kaj ĝui ĝiajn avantaĝojn. Sed mi estas profunde konvinkita, ke por la disvastigo kaj florado de Esperanto necesas la ekzisto de forta junular-movado, kia povas esti TEJO.

Nia junular-movado havas difinitan taskon en Esperantio kaj mi volus, ke pri tio ekestu pli vasta kompreno inter la Esperantistoj.

Vi, kiuj estas en niaj vicoj kaj vi, kiuj iam spertis TEJO-kunvenon, plifortigu ĉiel ajn nian organizon. Subtenu la agadon de via estraro kaj la L.O.K. aktivu por TEJO kaj partoprenu kiel eble plej grandnombre la 11-an Internacian Junularkunvenon en l'Aquila.

Roel Kraefft.

La letero.

Hodiaŭ la poŝtisto alportis leteron eksterlandan. Je granda distanco mi jam konstatis, ke la poŝtajo havas ian rilaton kun nia idealo. Du imponaj verdaj steloj ornamas la koverton kaj apud la steloj per grandaj ruĝaj literoj la sendinto volas sciigi la mondloĝantaron, ke Esperanto estas internacia lingvo, facile lernebla, kiun nepre ĉiu homo studu, por ke ni eterne vivu en paco.

Dum ke mi demandis min, kial li skribas tion sur la koverto (ne-Esperantistoj ja ne povas kompreni tiujn frazojn) la belaj poŝtmarkoj tiris mian atenton. Mi konstatis, ke ili venas el Argentino. Same do ankaŭ la letero.

Anstataŭ tuj legi la leteron, mi mallongan tempon meditante faris al mi imagon pri la nekonata Argentino.

- Tre verŝajne li estas tre entuziasma Esperantisto. Li certe fervore

propagandas kaj je ĉiuj siaj jakoj li portas la verdan stelon. Kompreneble li ankaŭ posedas bicikloflaĝeton kun nia simbolo. Ĉe la pordo li fiksas grandan tabulon kun la vortoj „Esperanto parolata”.

Kaj sendube li parolas la internacian lingvon flue. Estas kvazaŭ mi aŭdas lin, - ne, ne estas „li”, sed fraŭlino, kiu parolas. Aŭskultu ŝian velurdolĉan voĉon. Mi fermas la okulojn kaj - mi vidas ŝin, klare vidas ŝin. Eleganta, ĉarma fraŭlino kun gagatnigra hararo kiu afable ride-tanta pli kaj pli alproksimiĝas. Mi etendas la manon sed - mi sentas nenion Samtempe mi vekigiĝis el mia meditado Rapide mi prenis la koverton kaj kun tremanta mano malfermis ĝin. Sciavida mi malfaldis la leteron

Kaj?

Estis ĉenletero, kaj eĉ ne de fraŭlino.



daŭrigo de paĝo 42.

Kaj fine la klorofil-verdaĵon, kiun ĉiu normala vegetaĵo havas en siaj foliĉeloj.

El la akvo kaj karbondioksido la vegetaĵo formas helpe de sunenergio la sukeron aŭ amelon. Kaj nepre bezona medio por ĉi tiu mirinda transformiĝo estas verda koloraĵo-klorofilo.

Jen graveco de fotosintezo por ĉiu vivaro. La vegetaĵaro nutriĝas tiamaniere per neorganaĵo. Similon povas neniu alia vivulo. Eĉ la homo ne povas fabriki sukeron tiel, kiel faras ĉie simpleta verda vegetaĵeto. La animaloj devas preni ĉi produktojn de l'vegetaĵoj manĝinte ilin. Jen natura ordo: vegetaĵoj por herboman-

ĝantoj, tiuj ĉi por karnomangantoj kaj tiuj ĉi denove enteriĝintaj disponigas al vegetaĵoj bezonajn elementojn.

Nun vi povas imagi kiom gravas la verda koloraĵo-klorofilo en la naturo. Ĝi estas medio por fotosintezo, sen kiu ne eblus la vivo. La Tero povus nomiĝi **Verda Planedo**, ĉar nur nia planedo surportas la vivon bazitan sur verdaj vegetaĵoj.

Esperantistoj estu fieraj pro la verda koloro sur la kvinpinta stelo. Same kiel la koloro de l'espero regas en la naturo, la esperantista verda stelo ekregu en la homaro, alportadu al ĝi la saman utilon, kaj formu medion por „la sintezo de l'homaro”.

ANKRO.

Anglujo: (La Esperantista Junularo en Britujo). Okazis pluraj provoj por starigi junularan organizaĵon Esperantistan en Britujo. Antaŭ 1939. la Skolta Esperantista Ligo floris. Ĝis hodiaŭ ĝi ankoraŭ ekzistas, sed ĝi allogas nur al skoltoj.

Dum 1940 Sro J. W. Holland kaj F-ino N. Rees kondukis la Britan Sekcion de TEJO. F-ino Rees deĵoras ankoraŭ kiel peranto por „LJV”. La Brita Esperantista Asocio havas specialan sekcion por junuloj, sed nenia speciala provizo estiĝas. La Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj (S.B.E.T.) iam eldonis la revueton „La Juna Esperantisto”, sed ĉesigis la eldonon, kiam „La Juna Vivo” rekomencis. „F-ino Rees eldonis du novaĵ-leterojn (Nov. 1950 kaj marto 1951). En 1953, junulo el Shef-

field promesis daŭrigi la eldonadon, sed tion ne faris. Estis kunveno de TEJO ĉe la Brita Esp. Kongreso en Burnemouth dum 1953, sed nenio okazis poste. Esperanton oni instruas en kelkaj lernejoj dum pluraj jaroj, sed ĉu interkomunikado okazis (krom per S.B.E.T. agadoj), mi ne scias.

Do en julio 1954 Esperanto Youth No. 1. (Esperanto Junularo) eldoniĝis kaj estis sekvata per No. 2 en oktobro 1954, No. 3 en januaro 1955 kaj No. 4 en aprilo 1955.

La folio celas kolekti kaj disvastigi novaĵojn pri la uzo de Esperanto inter la junularo. Oni intencas aranĝi kunvenon de junuloj ĉe la Brita Esperanto kongreso en Swanwick dum Pasko (9an de aprilo).

Charles Bardsley, gvidanto de Esp. Youth Club
(Klubo por Esperantistaj Junuloj). Lancs.
42 Westbourne Street, OLDHAM,

Svislando: La Junularsekcio de la Svisa Esperanto Societo havas novan gvidantaron. Sro Bruno Graf pro manko de tempo devis forlasi la estraron en aprilo. Ekde tiu tempo la Junularsekcio estas gvidata de amikoj Gacond Claude, kiel sekciestro kaj de Abegg Max kiel anstataŭanto. Sro Graf Bruno funkcios kiel konsilanto.

Franco: koran dankon al S-ino Lili Giloteaux pro la sendado de la sumo de 150,- ned. guldenoj, same ni dankas el

Germanujo: sron Rolf Brune pro la sendo de la malnovaj TEJO-kotizoj. La du sumoj ebligas al ni la eldonon de du novaj numeroj de LJV. La nova peranto Sro Kiessling skribis leteron, ke pro privataj aferoj li ne plu povas funkcii, kiel peranto kaj li petas liberigon de tiu funkcio. Kiu germana amiko pretas kaj kapablas fariĝi TEJO-peranto?

Ĝis nun ne atingis nin sciigo pri la interzona renkontiĝo dum la pasokaj tagoj. La redakto atendas artikolon.

(de la 7a ĝis la 14a de aŭgusto 1955a).

Kun bedaŭro ni devas anonci, ke la ricevitajn kliŝojn ni ne povas uzi. Laŭ nia presisto ili taŭgas nur por la t.n. „artpapero”. Komence ni intencis tion aparte presigi kaj aldoni la foliojn al LJV, sed ĝi kostus preskaŭ 100 ned. guldenojn. Bedaŭrinde la financa stato de TEJO ne permesas al ni tian lukson. Sed la invitiloj, ricevitaj de L.O.K. estas tiom belaj, kiom neniam pli frue, do la legantoj tamen vidas la bildojn.

La L.O.K. eldonis sian duan oficialan bultenon, kiun ricevis dume ĉiuj kongresvizitontoj.

(Bedaŭrinde la redaktejo ankoraŭ ne ricevis ĉiujn adresojn, sed estas jam certe, ke partoprenos pli ol 100 TEJO-anoj. Ju pli granda nombro, des pli granda la sukceso. Red.)

La eksperimento por plialtigi la

nivelon de niaj kongresoj estas grandioza. De ni ĉiuj dependos, ĉu ni es-
tontece havos sukceson aŭ ne.

Estu niaj kunvenoj vera manifesta-
do, vera pruvo de la saneco de nia
organizo.

Dum ĉiuj kongresoj estis sportaj
ludoj. Ek de nun ni volas enkonduki
„Internaciajn Konkursojn” por gvidi
la bonan volon de la junularo en la
ĝustan spuron; ni dum la ĉi jara
kongreso starigas malgrandan olim-
piadon kun juĝantaro, rigardantoj,
svingado de flagoj kaj super ĉio kun
allogaj premioj donotaj kolektive al
la grupoj kaj unuope al la gajnantoj.

Ni volas venki la aĉan apation. Ĝi
estas ĉe ni malpli, ol en alia orga-
nizo, ĉar ni havas nian idealon, nian
flamon, sed ĝi tamen ĉie ĉeestas.

LA VASTA MONDO

..... en ĉiu tempo logas la ge-
junulojn kaj invitas ilin al gaja va-
gado. Per televidilo mi vidis ankaŭ
Vian deziron, kara leganto! Vi volas
viziti la mondon! Jen ek!!

Mia alvoko en la decembra n-ro
1954 estas aŭdita de multaj amikoj.
Pluraj eĉ jam deklaris sin pretaj
gastigi tute malmultekoste, kelkaj
eĉ senkoste, gejunulojn el nia TEJO.
Mi plej kore dankas al ĉiuj, kiuj ĝis
nun ofertis gastrajton al niaj vo-
jaĝontoj, kaj mi **invitas ĉiujn al imi-
tado!**

Do, se Vi volas ĝui la vere allogajn
ofertojn de niaj samcelanoj, aŭ se
Vi mem - aŭ Viaj amikoj - povas in-
viti Vojaĝonta(j)n kamarad(in)o(j)n
al nemultekosta eŭ eĉ senkosta res-
tado, tiam skribu - mi petas - al la

TEJO-Vojaĝservo
Reiter Heinrich
Salzburg I, 557
Austrio.

P.S.:

Se Vi bezonas
respondon, ne forgesu
almeti respondkuponon internacian!

Nun verŝajne la grupa organizado dependas de la iniciatemo de samideanoj viglaj kaj volemaj. Ne estas tre malfacile trovi dek personojn (maksimuma nombro por grupo) kiuj partoprenu la diversajn konkursojn. Oni povas formi grupon kun amikoj de la sama esperanto-centro, kun samideanoj de la sama urbo aŭ lando. Gejunuloj kiuj scipovas sportludi povas sin prepari unuope sen kolektiva ekzercado; same je teatro ĉar ne estas necese prezenti ion komunan sed ankaŭ skeĉojn diseparitajn. Ĉiu grupestro komuniku al ni kiel eble plej baldaŭ la nomon de sia grupo, la nomojn de la konkurantoj kaj la konkursojn kiujn ili deziras partopreni.

KELKAJ DETALOJ.

Sporto.

Ni ĉeestis plurfoje sportajn konkursojn kaj ni konscias ke inter niaj junaj samideanoj estas veraj sportuloj kun elstaraj sportaj kapabloj. Kion diri, ekzemple, pri Kralj Drago kiu venis al nia hilversuma kunveno pasintjare per biciklo? Kaj multajn aliajn ni konas kiuj certe donos veran sportan valoron al niaj malgrandaj olimpiadoj. Tial ni donas al sporto tiom da graveco, ponante ĝin en niaj „Internaciaj Konkursoj” flanke al la teatraj prezentoj.

Ni precizas ke LOK akceptos sportojn ĉiuspecajn: estas nur necese ke ĉiu sporto havu almenaŭ du konkurantojn.

Oni donos maksimume 150 poentojn por la tutaj sportkonkursoj kaj, oni uzos disdonan kriterion laŭ nombro kaj la speco de la konkursoj farotaj.

Teatro.

Laŭ niaj intencoj ĝi estos la ĉefpunkto de niaj konkursoj. Al niaj

prezentoj estos invitataj ankaŭ la urbaj aŭtoritatoj kaj elstaraj personoj naciaj kaj internaciaj. La konkurado inter la grupoj levigos la artan nivelon de la prezentoj de niaj kunvenoj.

Ne estas necese verŝajne prezenti teatrajn ĉefverkojn: ili postulas egan laboron. Sufiĉos ankaŭ skeĉoj, teatraĵetoj, varieteoj ktp.

Ĉiu grupo havos je sia dispono la scenejon dum tridek minutoj. Se oni deziras pli longan ludodaŭron oni informu ĝustatempe LOK-n ĉiukaze ne post 1/7.

Folkloro.

La konkurso okazos en la mirinda pejzaĝo de Lago de Scenno okaze de nia ekskurso. Ni esperas ke ni havos la okazon admiri tie senfinan serion da kostumoj el ĉiu lando de la tero. Ĉiu grupo sin prezentos al la unua elektado. Estos elektataj de internacia juĝantaro la du plej belaj kostumoj de ĉiu grupo, unu vira kaj unu virina. Okaze de samseksa grupo oni elektos same du kostumojn.

Oni donos tiam poentojn (maksimume 25 po persono) al ĉiu konkuranto. Do, grupo, reprezentata en la folkloro konkurso de du personoj, povas gajni maksimume 50 poentojn.

Poezio kaj Skizo.

Sendu al ni poemojn pri ĉiu temo kun ĉiu ajn formo kaj longeco kondiĉe ke ili estu en esperanto kaj originale verkitaĵ.

Tiuj kiuj scipovas uzi penikojn kaj krajonojn eklaboru. Ni atendas amason da skizoj. La plej bela estas la simbolo de nia IJK kaj per ĝi oni publikigos afiŝanoncojn, glumarkojn, ktp. La grandeco por la skizoj estas 21 × 27 cm.

Skizojn kaj poemojn oni sendu al LOK antaŭ 1/7. Ĉiu skizo kaj ĉiu

poemo ricevos poentojn por la grupo konkuranta.

Parolado.

Dum la kultura vespero okazos ankaŭ parolad-konkurso pri iu temo kiun oni povas elekti kaj anonci jam nun en la aliĝilo.

Poentoj.

Oni donos poentojn al ĉiu konkuranto aŭ al ĉiu grupo kaj je ĉiu konkurso. Oni akceptos ankaŭ izolajn konkurantojn sed ili povas ricevi nur individuajn premiojn.

Partoprenu kiel eble plej multajn konkursojn por havi pli grandan gajneblecon!

En ĉiu konkurso escepte de sporto, la poentoj estos donataj de dek-membra komisiono el kiuj ĉiu disponos je 1/10 el la tuta poentaro disdonebla en ĉiu konkurso. Ekzemple, en la folkloro konkurso ĉiu juĝanto disponas je 5 poentoj maksimume po grupo. Ĉar ĉiu grupo konkuras kun du personoj, la juĝanto rajtas doni maksimume 2 kaj 1/2 al ĉiu persono.

La poentojn oni donos laŭ la sek-

vanta tabelo:

Sporto	maksimume	150 poentojn
Teatro	„	150 „
Folkloro	„	50 „
Poezio	„	50 „
Skizo	„	50 „
Parolado	„	50 „

Individuaj premioj.

Por havi ankaŭ la partoprenon de izolaj konkurantoj kaj por premii la individuajn valoron estos krome disdonataj individuaj premioj.

En la sportaj kon. Oni disdonos medalojn kaj diversspecajn premiojn al la gajnontoj de ĉiu konkurso.

En la teatraj kon. Oni donos premion al ĉiu konkuranto de la gajnonta grupo.

En la folkloraj kon. Estos premiataj la plej bela kostumo virina kaj vira.

La poemo kiun oni juĝos plej arta estos premiata kaj publikigata en nia organo.

La skizo-simbolo de nia IJK ricevos ankaŭ riĉan premion.

En la paroladkonkurso oni premios la gajnanton.

FINA PREMIO POR LA GRUPO KIU GAJNOS LA PLIMULTON DE LA POENTOJ ESTAS SENPAGA SEMAJNA RESTADO DUM NIA POSTKUNVENO (14/8-21/8).

UNUA LISTA DE LA KARAVANESTROJ

Aŭstrio	S.ro Reiter, H.	557 A. Salzburg I
Hispanio	S.ro Molera, R.	Hospital 13 - Moja (Barcelona)
Jugoslavio	S.ro Drago, K.	Rozna Dolina 6-22 - Ljubljana
Francio	S.ro Pejrault, Y.	10 Rue St. Michel-Saintes (Ch. M.)
Germanio	S.ro Krüger, H.	Eisenbahnstr. 29 - Berlin S. O. 36
Germanio	S.ro Hopfenmüller, A.	Bayerstr. 23 - Aschaffenburg/Main
Nederlando	S.ro Van Moorst, B.	Eendrachtspark 19 - Bussum
Sicilio (It.)	S.ro Boscarino, J.	C. SO V. Veneto 92 Ragusa
Svedio	S.ro Kassai, S.	Box 326 - Sundbyberg 3

KIAMANIERE LA HOMOJ EKLERNIS BREDADI FIŝOJN?

(Esperantigis Jos. Steppan).

En malgranda franca vilaĝo vivis kamparana familio. La patro okupis sin per fiŝkaptado, la patrino prizorgis la mastrumadon. Joĉjo, la fileto helpis al la patro per tuta sia forto.

Foje la knabo rimarkis trut-migradon en la rivereto. La fiŝoj rapidegis zig-zage. Joĉjo rimarkis, ke ili puŝas unu la alian. Jen, subite li vidis, kiel truto elfluigis fiŝ-ovojn kaj kiel el aliaj fiŝoj eliĝis blanka fluaĵo en la akvon. Poste la fiŝoj fornaĝis.

Joĉjo kuris al la patro kaj rakontis al li, kion li ĵus observis. La patro ridis kaj diris:

- Ĉu vi ankoraŭ ne vidis, kiamaniere la fiŝoj frajas? Tio estas la ovoj de la fiŝoj. El ili estiĝos malgrandaj fiŝoj. Se tio ne okazus, ne estus fiŝoj.

Multaj jaroj pasis. Joĉjo plenkreskis kaj edziĝis. Li fariĝis bonega fiŝkaptisto. Li tre ŝatis ĉi tiun okupon, ĉar ĝi donis nutraĵon al li kaj al lia familio. Kaj al multaj aliaj familioj.

Kun bedaŭro li rimarkis, ke la kaptadrezultoj pli malgrandiĝis de jaro al jaro. La fiŝoj iom post iom malaperis el la hejma rivereto. La fiŝkaptado apenaŭ donis profiton.

Nun Joĉjo rememoris, kion li observis dum sia infanaĝo. Li rememoris al la parolado kun la patro - kaj en lia kapo ekiĝis ideo: la ideo bredadi fiŝojn. Kiel li opiniis, tiel li faris.

Li iris al la lokoj de la rivereto, kie ankoraŭ estis trutoj kaj kaptis multajn de ili. El kelkaj li premis la fiŝovojn kaj el la aliaj la blankan

fluaĵon, la fiŝspermojn kaj li verŝis la tuton en sian rivereton, kie oni jam de longe ne vidis trutojn. Ekde tiu ĉi tago komenciĝis ekscita tempo por Jozefo. Jam frumatene li iris al la rivereto kaj li revenis nur malfrue vespere. Hejme la familianoj tre ĉagrenis pro lia mallaboremo.

La najbaroj ridis pri li kaj opiniis, ke li frenezigiĝis. Ili opiniis, ke li iam vidis belan nikson kaj nun li vane ŝin serĉadas.

Tio estis por Jozefo malfacila, zorgoplena tempo. Tamen li toleris ĉiun mokon kaj malhonoron. Li perfidis sian sekreton al neniu. Jen unutage li rimarkis, ke en la rivereto naĝas kelkaj malgrandaj trutetoj. Jozefo venkis! Kompreneble li sciis, ke la fiŝetoj estiĝis el la fiŝovoj, kiujn li verŝis en la rivereton.

Lia rivereto fariĝis plena je trutoj. Li bredadis fiŝojn tie, kie en la lasta periodo ne plu estis fiŝoj. La trutoj abundis en lia rivereto.

Ek de tiu ĉi tempo okupiĝis sciencistoj, bestbredistoj kaj fiŝkaptistoj pri tiu ĉi metodo. Nun oni bredadas trutojn eĉ en riveroj, kie neniam antaŭe estis fiŝoj. Eblas venigi la fiŝovojn el la plej malproksimaj lokoj. Hodiaŭ la fiŝbredado ne estas pli malfacila, ol la kokbredado.

Do ankaŭ la plej simplajn faraĵojn oni devas pripensi. Tial ni rememoras honore al Jozefo Remis, kiu kiel unua havis la ideon bredadi fiŝojn. Lia observo tre multe utilis al la homaro.

(El porlernanta revuo „Schulpost”).

Promenante printempe aŭ somere en la naturo, ni vere estas mirigataj per ĉarma koloraro. La vegetaĵaj burĝonoj disvolvas kaj montras al la mondo sian belecon. Ni vidas fierajn florojn de krizantemo, diverskolorajn petalojn de trikoloreto, humilajn sed ĉarmajn floretojn de lekantetoj aŭ miozotoj. Vegetaĵoj bunte elpentris herbejojn, kampojn, arbarojn kaj ĉie kvazaŭ floroj vokus: min rigardu! mi pleje belas.

Tamen plej potenca inter la koloroj estas la verda. Ĝin oni ne rimarkas pro la aliaj kaj tamen ĝi estas la plej abunda, kvazaŭ ĝi fonus por kolora flora balo. Ĝi donas al la naturo ĝian tipikan karakteron, freŝon kaj trankviligon.

Se ni rigardas unuopan vegetaĵon aŭ arbon ni povas vidi kiom vastan surfacon sur ĝi prenas la verda koloro. Precipe verdas la folioj kaj sur multaj ankaŭ la trunketo.

Kial la vegetaĵoj bezonas kolorojn sur sia korpo? Bela kaj bunta koloro de floroj havas funkcion allogan. Ĝi per sia okulfrapeco alvokadas insektojn, kaj donas al ili dolĉan mielsukon. Kaj la insektoj rekompence transportas nescie la polenon ebligante


te tiel la sekskunigon kaj multobligon de vegetaĵoj. La vegetaĵoj ne bezonantaj helpon de insektaro ekzemple herboj, ne havas okulfrapajn florojn.

La verda koloro de la folioj estas ankoraŭ pli grava. Ĝi grave rolas ne nur por vegetaro, sed eĉ por animaloj kaj la homo mem. Sen verda koloro ne eblus la vivo sur nia Tero.

Nun ni iomete rigardu en la laboratorion, kiun la vegetaĵo havas en siaj folioj.

En la ĉeloj de la verda folio estas multaj eroj, kiuj enhavas diversajn koloraĵojn, plej multe ili enhavas verdan kiun oni nomas klorofilo. Klorofileroj estas ege multaj kaj ilia suma surfaco multfoje superas la surfacon de la tuta vegetaĵo. Kaj ili estas ejo, kie okazas la plej grava proceso de la vivo nomata fotosintezo.

Por la fotosintezo la vegetaĵo bezonas kvar substancojn. Unue la akvon kiun per la radikoj ĉerpas la vegetaĵo el la tero. Due la karbon-dioksidon, kiu estas disponebla el la aero. Trie la sunenergion, kiun la suno malavare ŝprucas al nia Tero. daŭrigo sur p. 36.



KORESPOND- ADRESOJ

Ĉiu abonanto, aŭ grupo foje po jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Francujo: 12-16 jaraj gekomencantoj bezonas korespondantojn. Skribu al Sro M. RÉTOT, instruisto, 162 bd A. Briand, MONTREUIL (SEINE). Certa respondo.

Hispanujo: ESPERANTO GRUPO, MOYA (Barcelona) Str. Forn 19,

okazigos fine de majo letervesperon. 25 junaj gemembroj atendas viajn skribaĵojn. Certa respondo.

Nederlando: Joke Benz, Junoplantsoen 73, HAARLEM, dez. kor. kun gejunuloj el Grekujo kaj Indla. Certa respondo.